FILINJO (ruĝiĝante): Ĉu tio estos ja malagrabla por vi, kiam vi venos al ŝi? (Ŝi eksidas sur la genuoj de FRANCISKO.)

ALBENO: Ŝi ja tute ne estas timema.

SCEVOLO (leviĝas; malserene, irante al la tablo de la junaj sinjoroj): Ĉu mi fine vin retrovis? (Al ALBENO): Kaj vi, mizerega deloginto, ĉu vi rapidos, ke vi... Ŝi estas la mia! (La MASTRO observas ilin.)

FRANCISKO (al ALBENO): Ŝerco, ŝerco...

ALBENO: Ĉu ŝi ne estas la lia?

MIKANJO: For, lasu min sidi, kie plaĉas al mi.

SCEVOLO staras kun pugnigitaj manoj.

MASTRO (post li): Nu! nu!

SCEVOLO: Ha! Ha!

MASTRO (kaptas lian kolumon): Ha! Ha! (Flanke al li): Alion vi ne povas ekpensi! Ne por unu suo vi havas talenton. Kriegi! Tio estas ĉio, kion vi povas fari.

MIKANJO (al FRANCISKO): Lastafoje li faris ĝin pli bone —

SCEVOLO (al la MASTRO): Mi ne havas ankoraŭ humoron. Pli malfrue mi ĝin ripetos, kiam pli multe da homoj ĉeestos; vi vidos, Prospero; mi nur bezonas publikon.

DUKO de CADIGNAN eniras.

DUKO: Jam tre emociaj! (MIKANJO kaj FILINJO rapidiras al li.)

MIKANJO: Mia dolĉa duko!

FRANCISKO: Bonan vesperon, Emilo! (Li konatigas ALBENON): Mia juna amiko Albeno, kavaliro de la Tremouille — la duko de Cadignan.

DUKO: Mi estas tre ĝoja, konatiĝi kun vi. (Al la virinoj, kiuj pendas je li): Lasu min, infanoj! — (Al ALBENO): Vi ankaŭ vizitas ĉi tiun kuriozan gastejon?

ALBENO: Mi treege estas konfuzita.

FRANCISKO: La kavaliro alvenis en Parizo nur antaŭ kelke da tagoj.

DUKO (ridante): Vi elektis ja tre belan tempon!

ALBENO: Kial?

MIKANJO: Kian parfumon de nove li havas. Ĝenerale, ne ekzistas en Parizo iu alia homo, kiu odoras tiel agrable .... (Al ALBENO): Tiel oni ne rimarkas ĝin.

DUKO: Ŝi parolas nur pri tiuj sepcent aŭ okcent, kiujn ŝi konas tiel bone kiel min.

FILINJO: Ĉu vi permesas, ke mi ludu kun via spado? (Ŝi tiras lian spadon el la ingo kaj briletigas ĝin.)

GRAIN (al la MASTRO): Kun tiu! ... Kun li mi vidis ŝin! (La MASTRO aŭskultas rakonton de li, videble mirante).

DUKO: Ĉu Henriko ne ĉeestas ankoraŭ? (Al ALBENO): Se vi tiun vidos, vi ne bedaŭros, ke vi venis ĉi tien.

MASTRO (al la DUKO): Nu, ĉu ankaŭ vi ĉeestas de nove? Tio min ĝojigas. Ni ja dum longa tempo jam ne havos ĉi tiun plezuron.

DUKO: Kial? Mi fartas tre bone ĉe vi.

MASTRO: Tion mi kredas. Sed, ĉar vi ĉiuokaze estos unu el la plej unuaj . . .

ALBENO: Kion signifas tio?

MASTRO: Vi ja komprenas min. — La plej feliĉaj estos la unuaj! . . . (Li iras malantaŭen.)

DUKO (meditinte): Se mi estus la reĝo, mi lin farus mia kortegana harlekeno. Pli ĝuste, mi havus multajn korteganajn harlekenojn, sed li estus unu el ili.

ALBENO: Kiel li opiniis tion, ke vi estas la plej feliĉa?

DUKO: Li opinias, kavaliro —

ALBENO: Mi vin petas, ne diru al mi kavaliro. Ĉiuj nomas min Albeno, simple Albeno, ĉar, sciu, mi aspektas tiom juna.

DUKO (ridetante): Bone . . . sed vi devas diri al mi Emilo . . . jes?

ALBENO: Se vi ĝin permesas, plezure, Emilo.

DUKO: Ili iĝas timinde spritaj, tiuj homoj.

FRANCISKO: Kial timinde? Min tre trankvil-

igas tio. Dum la popolaĉo havas humoron por ŝercoj, ne okazos ja io serioza.

DUKO: Nur, ke tamen iliaj spritoj estas tro strangaj. Ĵus mi sciiĝis pri afero, kiu meritas pripensadon . . .

FRANCISKO: Rakontu.

FILINJO, MIKANJO: Jes, rakontu, dolĉa duko.

DUKO: Ĉu vi konas Lelanĵon?

FRANCISKO: Certe — la vilaĝon . . . la markizo de Montferrat havas tie unu el siaj plej belaj ĉasejoj.

DUKO: Tute ĝuste; mia frato estas nun ĉe li en la kastelo kaj li skribis al mi pri tiu afero, kiun mi volas rakonti al vi. En Lelanĵo ili havas vilaĝestron, kiu estas tre neamata.

FRANCISKO: Se vi povas nomi al mi vilaĝestron, kiu ja estas amata —

DUKO: Aŭskultu. Jen, la virinoj el la vilaĝo migris al la domo de la vilaĝestro — kun ĉerko . . .

FILINJO: Kiel? . . . Ili portis ĝin? Ili portis ĉerkon? Mi por tuta mondo ne portus ĉerkon.

FRANCISKO: Silentu do — neniu postulas de vi, ke vi portu ĉerkon. (Al la DUKO): Nu?

DUKO: Kaj kelke da tiuj virinoj iris tiam en la loĝejon de la vilaĝestro kaj deklaraciis al

li, ke li devas morti — sed ke oni faros al li la honoron, entombigi lin.

FRANCISKO: Nu, ĉu oni mortigis lin?

DUKO: Ne — mia frato almenaŭ nenion skribis al mi pri tio.

FRANCISKO: Nu jen! . . . Krieguloj, babiluloj, harlekenoj — tiaj estas ili. Hodiaŭ ili en Parizo kriegas kontraŭ la Bastiljo, por ŝanĝo de plezuro — tion ili faris jam sesfoje . . .

DUKO: Nu, se mi estus la reĝo, mi jam estus finiginta tion . . . jam de longatempe . . .

ALBENO: Ĉu estas vero, ke la reĝo estas tiel bonkora?

DUKO: Ĉu vi ne estas ankoraŭ konatigita al Lia reĝa moŝto?

FRANCISKO: La kavaliro ja estas la unuan fojon en Parizo.

DUKO: Efektive, vi estas nekredeble juna. Kiom da jaroj, se oni havas permeson por demandi?

ALBENO: Mi nur aspektas tiel juna, mi estas jam deksepjara . . .

DUKO: Deksep — kiom estas ankoraŭ antaŭ vi! Mi havas jam dudekkvar jarojn . . . mi komencas bedaŭri, kiom da mia juneco mi ne eluzis.

FRANCISKO (ridas): Tio estas bone dirita! Vi, duko . . . por vi certe ĉiu tago estas perdita,

en kiu vi ne ekokupis virinon aŭ ne mortpikis viron.

DUKO: La malfeliĉo estas nur, ke oni preskaŭ neniam ekokupas la ĝustan — kaj ĉiam mortpikas malĝustan. Kaj tiamaniere oni tamen ne eluzas sian junecon. Estas precize tio, kion diras Rollin.

FRANCISKO: Kion diras Rollin?

DUKO: Mi rememoris pri lia nova teatraĵo, kiun ili ludas en la Comédie — en tiu troviĝas ĉarma komparo. Ĉu vi ne rememoras?

FRANCISKO: Mi tute ne havas memorkapablon pri versoj —

DUKO: Mi, bedaŭre, ankaŭ ne . . . mi nur pri la senco rememoras . . . Li diras, ke juneco, kiun oni ne ĝuas, estas kiel plumpilko, kiun oni lasas kuŝi sur la sablo, anstataŭ ekĵeti ĝin en aeron.

ALBENO (trosaĝe): Tion mi konsideras kiel ion tre pravan.

DUKO: Ĉu ne vere? — Iom post iom la plumoj perdas la kolorojn, ili elfalas. Estas eĉ pli bone, se ĝi falas inter arbustoj, kie oni ne retrovas ĝin.

ALBENO: Kiel oni tion komprenu, Emilo?

DUKO: Ĝi pli bone estas sentebla. Cetere, se mi scius la versojn, vi ĝin tuj komprenus.

ALBENO: Ŝajnas al mi, Emilo, ke vi ankaŭ povus verki versojn, se vi ja volus.

DUKO: Kial?

ALBENO: De kiam vi ĉeestas, ŝajnas al mi, kvazaŭ ekflamus la vivo —

DUKO (ridetante): Jes? Ĉu ĝi ekflamas?

FRANCISKO: Ĉu fine vi ne volas sidiĝi ĉe ni?

(Dume venis DU NOBELOJ kaj sidiĝas ĉe tablo iom malproksima; la MASTRO videble diras malĝentilaĵojn al ili.)

DUKO: Mi ne povas resti. Sed ĉiuokaze mi revenos ankoraŭ unufoje.

MIKANJO: Restu ĉe mi!

FILINJO: Lasu min kuniri!

(Ili volas lin reteni.)

MASTRO (antaŭen venante): Do, lasu lin! Vi tute ne estas ankoraŭ sufiĉe malvirtaj por li. Li devas kuri al publikulino sur la strato; ĉe tia li fartas plej agrable.

DUKO: Mi revenos tute certe; jam, por ne maltrafi Henrikon.

FRANCISKO: Sciu, kiam ni venis, Henriko ĵus foriris kun Leokadio.

DUKO: Jes? — Li edziĝis kun ŝi. Ĉu vi scias ĝin?

FRANCISKO: Efektive? — Kion diros pri tio la ceteraj?

ALBENO: Kiuj ceteraj?

FRANCISKO: Ŝi, sciu, estas de ĉiu amata.

DUKO: Kaj li volas foriri kun ŝi . . . kion scias mi . . . oni rakontis tion al mi.

MASTRO: Jes? Ĉu oni rakontis tion al vi? (Li rigardas la DUKON.)

DUKO (rigardas la MASTRON; tiam): Tio estas tro malprudenta. Leokadio ja estas kreita, por esti la plej grava, la plej belega kurtizano en la mondo.

FRANCISKO: Kiu ne scias tion?

DUKO: Ĉu ekzistas io pli malprudenta, ol fortiri iun de lia vera profesio? (Ĉar FRANCISKO ridas): Mi ne ŝerce opinias tion. Ankaŭ por kurtizano oni devas esti naskita — kiel por konkeristo aŭ por poeto.

FRANCISKO: Vi diras paradoksojn.

DUKO: Mi bedaŭras ŝin — kaj Henrikon. Li devus resti — ne tie ĉi — mi lin engaĝigus ĉe la Comédie — kvankam ankaŭ tie — ĉiam ŝajnas al mi, kvazaŭ neniu komprenus lin tiel tute, kiel mi. Cetere, tio eble estas trompiĝo — ĉar mi havas ĉi tiun saman senton rilate al la plej multaj el la artistoj. Sed, mi devas diri, ke, se mi ne estus la duko de Cadignan, mi dezirus esti tia komediisto — tia . . .

ALBENO: Kiel Aleksandro la Granda.

DUKO (ridetante): Jes — kiel Aleksandro la

Granda. (Al FILINJO): Donu mian spadon. (Li puŝas ĝin en la ingon. Malrapide): Tio estas tamen la plej bona maniero, ŝerci pri la mondo; iu, kiu povas ludi antaŭ ni, kion li volas, ja estas pli ol ni ĉiuj.

ALBENO (rigardas lin mirante).

DUKO: Ne pripensu, kion mi diris; ĉio estis vera nur en tiu sama momento. — Ĝis revido!

MIKANJO: Kisu min, antaŭ kiam vi foriras!

FILINJO: Ankaŭ min! (Ili pendas je li; la DUKO kisas ilin ambaŭ samtempe kaj foriras. Dume)

ALBENO: Li estas mirinda homo!

FRANCISKO: Tio estas vero . . . sed, ke ekzistas tiaj homoj, tio preskaŭ estas motivo por ne edziĝi.

ALBENO: Cetere, klarigu al mi, kiaj estas tiuj knabinoj?

FRANCISKO: Aktorinoj. Ili ankaŭ estas el la geaktoroj de Prospero, kiu estas nuntempe la mastro de ĉi tiu kabareto. Certe ili faris pli frue ne ion grave diferencan ol nun.

VILHELMO (enkuregas kvazaŭ senspira).

VILHELMO (al la tablo, ĉe kiu sidas la aktoroj, kun mano sur la koro, pene, sin apogante): Savita, jes, savita!

SCEVOLO: Kio okazis? Kio estas al vi?

ALBENO: Kio okazis al tiu viro?

FRANCISKO: Tio estas jam teatro. Atentu!

ALBENO: Ah —?

MIKANJO, FILINJO (rapide iras al VILHELMO): Kio okazis? Kio estas al vi?

SCEVOLO: Eksidu, trinku unu gluton!

VILHELMO: Pli, pli!... Prospero, pli da vino! — — Kiom mi kuris! Mia lango algluiĝis. Ili estas ĉe miaj kalkanoj.

JULIO (ektremas): Ho, atentu, entute ili estas ĉe niaj kalkanoj.

MASTRO: Rakontu do, kio okazis?... (Al la aktoroj): Emocion, pli da emocio!

VILHELMO: Virinojn ĉi tien — virinojn! — Ha! — (Li ĉirkaŭprenas FILINJON): Tio ja reviv-igas! (Al ALBENO, kiu estas tre konsternita): La diablo min forportu, knabo, se mi pensis, ke viva mi revidos vin! (Kvazaŭ spione aŭskultante): Ili venas, ili venas! (Li kuras al la pordo): Ne, nenio! — Ili...

ALBENO: Strange!... Estas efektiva bruo, kvazaŭ homoj tre rapide preterkurus ekstere. Ĉu tio ankaŭ estas direktata el ĉi tie?

SCEVOLO (al JULIO): Li ĉiam havas iun nuanc-on — estas tro ridinde!

MASTRO: Diru do fine al ni, kial ili estis ĉe viaj kalkanoj?

VILHELMO: Nenio eksterordinara. Sed, se ili kaptus min, tio tamen kostus mian kapon — mi bruligis domon.

Dum tiu ĉi sceno de nove venas junaj NOBELOJ kaj sidiĝas ĉe tabloj.

MASTRO (mallaŭte): Daŭrigu! Daŭrigu!

VILHELMO (mallaŭte): Kion daŭrigi? Ĉu tio ne estas sufiĉa, ke mi bruligis domon?

FRANCISKO: Diru, mia kara, kial vi bruligis tiun domon?

VILHELMO: Ĉar en ĝi loĝis la prezidanto de la plej supera juĝistaro. Kun tiu ni volis komenci. Ni volas forigi al la bonaj domhavantoj en Parizo la plezuron, loĝigi en siaj domoj homojn, kiuj sendas nin mizeregulojn en arestejon.

GRAIN: Li estas prava! Li estas prava!

VILHELMO (observas GRAIN'on kaj ekmiras; tiam li daŭrigas): Ĉiuj tiaj domoj devas iĝi ruinoj. Tri pliaj buboj kia mi, kaj plu ne ekzistos juĝistoj en Parizo.

GRAIN: Morton al la juĝistoj!

JULIO: Jes . . . tamen ekzistas eble unu, kiun ni ne povos pereigi.

VILHELMO: Mi dezirus koni tiun.

JULIO: La juĝisto en ni mem.

MASTRO (mallaŭte): Tio estas malkonvena. Pre-

terlasu tion. Scevolo, kriegu! Nun estas la ĝusta momento!

SCEVOLO: Vinon ĉi tien, Prospero, ni volas trinki je la morto de ĉiuj juĝistoj en Francujo!

(Dum la lastaj vortoj eniris la MARKIZO de Lansac kun sia edzino SEVERINO kaj ROLLIN, la poeto.)

SCEVOLO: Morton al ĉiuj, kiuj hodiaŭ havas la potencon en la manoj! Morton!

MARKIZO: Jen, Severino, tiamaniere oni akceptas nin.

ROLLIN: Markizino, mi vin avertis.

SEVERINO: Kio?

FRANCISKO (leviĝas): Kion mi vidas? La markizino? Permesu, ke mi kisu vian manon. Bonan vesperon, markizo! Diosaluton, Rollin! Markizino, vi kuraĝas veni en tiun ĉi ejon?

SEVERINO: Oni tiom rakontis al mi pri ĝi. Kaj cetere, ni hodiaŭ ja estas aventurantaj — ĉu ne vere, Rollin?

MARKIZO: Jes, kion vi opinias, vicgrafo, de kie ni venis? — De la Bastiljo.

FRANCISKO: Ĉu ili ankoraŭ nun tiom bruegas tie?

SEVERINO: Jes, certe! — Ŝajnas, kvazaŭ ili perforte volus penetri en ĝin!

ROLLIN (deklamas):

Kvazaŭ maro, kontraŭ bordoj ĵeteganta siajn ondojn,
Tre kolera, ke la tero, ĝia propra ja infano,
Kontraŭstaras —

SEVERINO: Ne, Rollin! — Ni lasis halti nian kaleŝon proksime de tie. Belega estis la aspekto; masoj ĉiam havas en si ion grandiozan.

FRANCISKO: Jes, jes, se ili nur ne tiel malbone odorus.

MARKIZO: Kaj mia edzino tiam insistis . . . mi devis ŝin konduki ĉi tien.

SEVERINO: Do, kio estas efektive ĉi tie aparta?

MASTRO (al la MARKIZO): Nu, ĉu vi ankaŭ ĉeestas, fripono sekiĝinta? Ĉu vi kunirigis vian edzinon, ĉar hejme ŝi ne estas sufiĉe certa por vi?

MARKIZO (ridante embarase): Li estas originalo!

MASTRO: Gardu ŝin, ke ŝi ne ĝuste ĉi tie estu forkaptata al vi. Tiaj noblaj sinjorinoj kelkfoje havas malbenitan avidon, provi ĝin kun efektiva vagabondo.

ROLLIN: Mi suferas nedireble, Severino!

MARKIZO: Infano mia, mi ĝin antaŭdiris al vi — ankoraŭ nun estas tempo por foriri.

SEVERINO: Do, kion vi volas? Mi ĝin trovas ĉarma. Ni fine sidiĝu.

FRANCISKO: Permesu, markizino, ke mi konat-

igu al vi la kavaliron de la Tremouille. Li ankaŭ ĉeestas la unuan fojon. — La markizo de Lansac — Rollin, nia fame konata poeto.

ALBENO: Mi tre ĝojas! (Komplimentoj; ili sidiĝas.)

ALBENO (al FRANCISKO): Ĉu ŝi estas unu el tiuj, kiuj ludas, aŭ . . . mi tute ne diskonas ilin.

FRANCISKO: Ne estu tiel malkapabla! Ŝi estas efektive la edzino de la markizo de Lansac . . . sinjorino treege honesta.

ROLLIN (al SEVERINO): Diru, ke vi amas min.

SEVERINO: Jes, jes, sed ne ĉiumomente min demandu!

MARKIZO: Ĉu ni malfruiĝis jam por iu sceno?

FRANCISKO: Ne multe. Tiu, jen, ludas kriman bruligiston, tiel ŝajnas.

SEVERINO: Kavaliro, vi certe estas la kuzo de tiu eta Lidio de la Tremouille, kiu edziniĝis hodiaŭ?

ALBENO: Jes, markizino, tio estis unu el la motivoj, kial mi venis Parizon.

SEVERINO: Mi rememoras, ke mi vin vidis en la katedralo.

ALBENO (embarasite): Mi estas treege flatita, markizino.

SEVERINO (al ROLLIN): Kia ĉarma eta junulo.

ROLLIN: Ha, Severino, neniam ankoraŭ vi konatiĝis kun viro, kiu ne plaĉis al vi.

SEVERINO: Ho, tamen kun unu, kaj kun tiu mi tuj edziniĝis.

ROLLIN: Ho, Severino, mi ĉiam timas — ke ekzistas eĉ momentoj, en kiuj via propra edzo estas danĝera por vi.

MASTRO (alportas vinon): Jen, vi ĝin havas! Mi dezirus, ke ĝi estu veneno; sed nuntempe ne estas ankoraŭ permesite, tion antaŭmeti al vi kanajloj.

FRANCISKO: Tio venos ankoraŭ, Prospero.

SEVERINO (al ROLLIN): Kio estas pri tiuj ĉi belaj knabinoj? Kial ili ne proksimiĝas? Se ni jam estas ĉi tie, mi ĉion volas ĝui. Cetere mi rimarkas, ke oni ĉi tie kondutas tre morale.

MARKIZO: Paciencon, Severino!

SEVERINO: Sur la strato, ŝajnas al mi, oni plej bone amuziĝas en nuna tempo. — Ĉu vi scias, kio okazis al ni hieraŭ, kiam ni promene veturadis sur la promenejo de Longchamps?

MARKIZO: Mi vin petas, kara Severino, por kio . . .

SEVERINO: Jen, iu bubo saltis sur la paŝbreton de nia kaleŝo kaj kriegis: En la

venonta jaro vi staros post via kuĉero kaj ni sidos en kaleŝo.

FRANCISKO: Ho, tio estas iom forta!

MARKIZO: Ho, Dio, mi pensas, ke oni ne devus tiom paroli pri tiaj aferoj. Parizo nuntempe havas iom da febro; sed tiu for pasos.

VILHELMO (subite): Mi vidas flamojn, flamojn, ĉie, kien mi rigardas, ruĝajn altajn flamojn!

MASTRO (al li): Vi ja ŝajnigas vin frenezulo, ne krimulo.

SEVERINO: Li vidas flamojn?

FRANCISKO: Ĉio tio ne estas ankoraŭ la ĝusta, markizino.

ALBENO (al ROLLIN): Mi ne povas diri al vi, kiom konfuzita mi estas jam de ĉio tio.

MIKANJO (al la MARKIZO): Mi ja ne salutis vin ankoraŭ, mia dolĉa porko maljuna.

MARKIZO (embarasite): Ŝi ŝercas, kara Severino.

SEVERINO: Mi tion ne povas eltrovi. Diru do, etulino, kiom da amantoj vi havis jam?

MARKIZO (al FRANCISKO): Estas mirinde, kiel facile la markizino, mia edzino, tuj povas konformigi sin al ĉiu situacio.

ROLLIN: Jes, estas mirinde.

MIKANJO: Ĉu la viajn vi kalkulis?

SEVERINO: Kiam mi estis ankoraŭ tiom juna kiom vi . . . certe —

ALBENO (al ROLLIN): Diru, sinjoro Rollin, ĉu la markizino ludas, aŭ ĉu efektive ŝi estas tia — mi tion absolute ne diskonas.

ROLLIN: Esti . . . ludi . . . ĉu vi tiel precize konas la diferencon, kavaliro?

ALBENO: Tamen . . .

ROLLIN: Mi ne. Kaj kion mi trovas tiel stranga ĉi tie, estas, ke ĉiuj ŝajnaj diferencoj estas kvazaŭ forigitaj. Efektivo alternas kun ludo — ludo kun efektivo. Jen, rigardu la markizinon. Kiel ŝi babilas kun tiuj knabinaĉoj, kvazaŭ ili estus samrangaj kun ŝi. Malgraŭ tio ŝi estas . . .

ALBENO: Io tute alia.

ROLLIN: Mi dankas al vi, kavaliro.

MASTRO (al GRAIN): Do, kiel okazis tio?

GRAIN: Kio?

MASTRO: Tiu afero kun la onklino, pro kiu vi sidadis du jarojn en arestejo.

GRAIN: Mi ja diris al vi, ke mi ŝin sufokis.

FRANCISKO: Tiu estas malmulte valora. Li estas diletanto. Mi ankoraŭ neniam vidis lin.

GEORGINJO (eniras rapide, vestita kiel plej ordinara publikulino): Bonan vesperon, infanoj! Ĉu mia Baltazaro ne ĉeestis ankoraŭ?

SCEVOLO: Geonjo! Eksidu ĉe mi! Via Baltazaro venos ankoraŭ sufiĉe ĝustatempe.

GEONJO: Se li post dek minutoj ne ĉeestos, li jam ne ĝustatempe venos — li tiam entute plu ne venos.

FRANCISKO: Markizo, tiun ĉi atentu. Ŝi estas efektive la edzino de tiu Baltazaro, pri kiu ŝi parolas, kaj kiu tre baldaŭ venos. — Ŝi ŝajnigas sin stratulino tute ordinara, Baltazaro ludas ŝian subtenanton. Malgraŭ tio ŝi estas la plej fidela edzino, kiun oni en la tuta Parizo povas trovi.

BALTAZARO (eniras).

GEONJO: Mia Baltazaro! (Ŝi kuras al li, ĉirkaŭprenas lin): Jen, vi ja ĉeestas!

BALTAZARO: Ĉio estas en ordo. (Silento ĉirkaŭ li): Ĝi ne meritis la penon. Mi preskaŭ bedaŭris lin. Vi devus pli bone inspekti viajn virojn, Geonjo, tio tedas min, mortigi esperoplenajn junulojn pro kelke da frankoj.

FRANCISKO: Bonege . . .

ALBENO: Kiel?

FRANCISKO: Li tiel bone poentas.

(La KOMISARIO eniras, alivestita, sidiĝas ĉe tablo.)

MASTRO (al li): Vi venis en bona momento, sinjoro komisario. Tiu ĉi estas unu el miaj plej bonaj aktoroj.

BALTAZARO: Cetere oni devus serĉi alian perlaboran enspezon. Ĉe mia animo, mi ne

estas malkuraĝulo, sed tia ĉi pano estas kun peno perlaborita.

SCEVOLO: Tion mi ja kredas.

GEONJO: Kio estas al vi hodiaŭ?

BALTAZARO: Mi diros ĝin al vi, Geonjo — ŝajnas al mi, ke vi estas iom tro karesa al la junaj sinjoroj.

GEONJO: Jen, kia infano li estas. Estu do prudenta, Baltazaro! Mi ja devas esti karesa, por konfidigi ilin.

ROLLIN: Kion ŝi nun diris, tio efektive estas profunde senchava.

BALTAZARO: Se mi devus kredi iam ajn, ke vi ion sentas, kiam la aliaj vin . . .

GEONJO: Kion vi ceteraj diras pri tio? Tiu ĉi stulta ĵaluzo lin eĉ ĵetos en tombon.

BALTAZARO: Hodiaŭ mi aŭdis ĝemon, Geonjo, kaj en momento, en kiu lia konfido estis jam sufiĉe granda!

GEONJO: Oni ne povas ĉesi tiel subite ŝajnigi sin enamiĝinta.

BALTAZARO: Gardu vin, Geonjo! La Seine-akvo estas profunda. (Sovaĝe): Se vi trompas min —

GEONJO: Neniam, neniam.

ALBENO: Mi absolute ne komprenas tion.

SEVERINO: Rollin, tio estas la ĝusta percepto!

ROLLIN: Ĉu vi opinias?

MARKIZO (al SEVERINO): Vi ankoraŭ nun povas foriri, Severino.

SEVERINO: Kial? Mi komencas farti tre agrable.

GEONJO: Mia Baltazaro, mi adoras vin. (Ĉirkaŭpreno.)

FRANĈISKO: Bone! Bone!

BALTAZARO: Kia idioto estas tiu?

KOMISARIO: Tio estas sendube tro akra — tio estas —

(MAŬRICO kaj STEFANO eniras; ili estas vestitaj kiel junaj sinjoroj, sed oni vidas, ke ili havas sur si malnovajn ĉifonitajn teatrokostumojn.)

DE LA TABLO DE LA AKTOROJ: Kiuj estas tiuj?

SCEVOLO: La diablo min forportu, se ili ne estas Maŭrico kaj Stefano.

GEONJO: Certe, estas ili.

BALTAZARO: Geonjo!

SEVERINO: Dio, kiel pentrinde belaj junaj viroj ili estas!

ROLLIN: Estas embarasige, Severino, ke ĉiu beleta vizaĝo tiel forte emocias vin.

SEVERINO: Por kio mi ja venis ĉi tien?

ROLLIN: Do, diru al mi almenaŭ, ke vi amas min.

SEVERINO (kun rigardo): Vi havas malfortan memorkapablon.

STEFANO: Nu, kion vi opinias, de kie ni venis?

FRANCISKO: Aŭskultu, markizo; ili estas du spritaj junuloj.

MAŬRICO: De geedzigo.

STEFANO: Por tio oni devas iom bel vesti sin. Alie tiuj malbenitaj policaj spionoj tuj estas post vi.

SCEVOLO: Ĉu vi akiris almenaŭ bonan ŝtelitaĵon?

MASTRO: Lasu vidi ĝin.

MAŬRICO (tirante horloĝojn el sia jako): Kion vi donos al mi por tio?

MASTRO: Por tiu ĉi? Unu lujdoron.

MAŬRICO: Ho ne!

SCEVOLO: Ĝi ne valoras pli multon.

MIKANJO: Tio ja estas horloĝo por sinjorino. Donu ĝin al mi, Maŭrico.

MAŬRICO: Kion vi donos por ĝi?

MIKANJO: Rigardu min!... Ĉu mi ne estas sufiĉa?

FILINJO: Ne, al mi — rigardu min —

MAŬRICO: Karaj infanoj, Tiom mi povas havi, ne riskinte mian kapon.

MIKANJO: Vi estas vanta simio!

SEVERINO: Mi ĵuras, ke tio ne estas komedio!

ROLLIN: Certe ne, ĉie ajn trabrilas io efektiva. Tio ja estas la ravindaĵo.

SCEVOLO: Kies geedzigo okazis?

MAŬRICO: La edziniĝo de la fraŭlino de la Tremouille — ŝi edziniĝis kun la grafo de Banville.

ALBENO: Ĉu vi aŭdis, Francisko? — Mi vin asertas, ke ili estas efektivaj friponoj.

FRANCISKO: Trankviliĝu, Albeno. Mi konas ilin ambaŭ. Jam dekfoje mi vidis ilin ludi. Ilia specialeco estas ŝajnigi sin elpoŝoŝtelistoj.

MAŬRICO (tiras kelkajn monujojn el sia jako).

SCEVOLO: Nu, hodiaŭ vi povas esti malŝparaj.

STEFANO: La geedzigo estis belega. La tuta nobelaro de Francujo ĉeestis. Eĉ la reĝo mem anstataŭigis sin.

ALBENO (emociite): Tio ĉio estas vero!

MAŬRICO (lasas monerojn ruliĝi sur la tablo): Tio ĉi estas por vi, amikoj, ke vi vidu, kiel ni kunapartenas.

FRANCISKO: Rekvizitoj, kara Albeno. (Li leviĝas kaj prenas kelkajn monerojn): Por ni ja ankaŭ defalu iom.

MASTRO: Forprenu ilin do . . . vi tiel honeste neniom akiris dum tuta via vivo!

MAŬRICO (tenas supren ŝtrumpobanton ornamitan per diamantoj): Kaj al kiu mi donacu ĉi tion?

GEONJO, MIKANJO, FILINJO (klopodas kapti ĝin).

MAŬRICO: Paciencon, vi dolĉaj musoj; pri tio

mi parolos ankoraŭ. Mi donos ĉi tion al tiu el vi, kiu elpensis novan karesmanieron.

SEVERINO (al ROLLIN): Ĉu vi ne permesus al mi konkurenci pri tio?

ROLLIN: Vi frenezigos min, Severino.

MARKIZO: Severino, ĉu ni ne foriru? Mi opinias . . .

SEVERINO: Ho ne. Mi fartas bonege. (Al ROLLIN): Ha, mi iĝas emociita —

MIKANJO: Kiamaniere vi akiris ĉi tiun ŝtrumpobanton?

MAŬRICO: En la katedralo estis tiom da kuntrudado, kaj se iu virino supozas, ke oni amindumas ŝin . . . (Ĉiuj ridas. GRAIN ŝtelas la monujon el la poŝo de FRANCISKO.)

FRANCISKO (revenante kun la moneroj al ALBENO): Ĉiom ludmarkoj. Ĉu vi nun estas retrankviligita?

GRAIN (estas forironta).

MASTRO (iras post li; mallaŭte): Tuj donu al mi la monujon, kiun vi tiris el la poŝo de tiu sinjoro.

GRAIN: Mi —

MASTRO: Tuj . . . aŭ vi fartos malbone.

GRAIN: Vi ne bezonas malĝentiliĝi. (Li donas ĝin al li.)

MASTRO: Kaj restu. Mi nun ne havas tempon

por inspekti viajn poŝojn. Kiu sciu, kion alian vi enpoŝigis. Reiru al via loko.

FILINJO: La ŝtrumpobanton mi gajnos.

MASTRO (iras al FRANCISKO, ĵetas al li la monujon): Jen, vi rehavu vian monujon. Vi perdis ĝin el via poŝo.

FRANCISKO: Mi dankas vin, Prospero. (Al ALBENO): Vi vidas, ke ni efektive estas inter la plej honestaj homoj en la mondo.

HENRIKO (ĉeestis jam de kelke da tempo; li sidis malantaŭe; subite li leviĝas).

ROLLIN: Henriko ĉeestas, Henriko —

SEVERINO: Ĉu li estas tiu, pri kiu vi tiom rakontis al mi?

MARKIZO: Jes. Tiu, pro kiu ni ja eniris ĉi tie.

HENRIKO (paŝas antaŭen, tute komediiste; li silentas).

LA AKTOROJ: Henriko, kio estas al vi?

ROLLIN: Atentu lian rigardon. Tuta mondo da pasio. Li, sciu, ludas propasiajn krimulojn.

SEVERINO: Mi tion tre ŝatas.

ALBENO: Kial li ne parolas?

ROLLIN: Li estas kvazaŭ en ekstazo. Rimarku. Atentu . . . li faris iun teruran krimon.

FRANCISKO: Li estas iom teatra. Estas, kvazaŭ li pretigus sin por monologo.

MASTRO: Henriko, Henriko, de kie vi venis?

HENRIKO: Mi mortigis iun.

ROLLIN: Nu, kion mi diris?

SCEVOLO: Kiun?

HENRIKO: La amanton de mia edzino.

(La MASTRO rigardas lin kaj videble sentas en tiu ĉi momento, ke tio povas esti vero.)

HENRIKO (rigardas supren): Nu jes, mi faris ĝin; kial vi rigardas min tiele? Ja estas tiel. Ĉu tio estas io tiom mirinda? Vi ĉiuj ja scias, kia knabinaĉo estis mia edzino; tio devis tiel finiĝi.

MASTRO: Kaj ŝi — kie estas ŝi?

FRANCISKO: Vidu, kiel la mastro konformigas sin. Rimarku, tio faras la aferon tiel natura.

(Bruo ekstere, ne tro forta.)

JULIO: Kia bruo estas ekstere?

MARKIZO: Ĉu vi aŭdas ĝin, Severino?

ROLLIN: Ĝi sonas, kvazaŭ trupoj pretermarŝus.

FRANCISKO: Ho ne, tiuj estas nia kara popolo de Parizo; aŭskultu, kiel ili blekegas. (Emocio en la kelo; ekstere iĝas silento): Daŭrigu, Henriko, daŭrigu.

MASTRO: Rakontu do, Henriko! — Kie estas via edzino? Kie vi forlasis ŝin?

HENRIKO: Ha, pri ŝi mi ne zorgas. Ŝi ne mortos pro tio. Ĉu tiu aŭ tiu, kian zorgon

kaŭzas tio al virinoj? En Parizo ĉirkaŭkuras ankoraŭ mil aliaj belaj viroj — ĉu tiu aŭ tiu —

BALTAZARO: Tio okazu al ĉiuj, kiuj forprenas niajn edzinojn!

SCEVOLO: Al ĉiuj, kiuj forprenas, kio apartenas al ni.

KOMISARIO (al la MASTRO): Tio estas ribeligaj paroloj.

ALBENO: Estas terure — tiuj ĉi homoj parolas serioze!

SCEVOLO: Pereu la procentegistoj en Francujo! Ni vetu, ke tiu bubo, kiun li surprizis ĉe sia edzino, estis ankaŭ unu el tiuj malbenitaj hundoj, kiuj ŝtelas nian panon.

ALBENO: Mi proponas, ke ni foriru . . .

SEVERINO: Henriko! Henriko!

MARKIZO: Sed, markizino!

SEVERINO: Mi vin petas, kara markizo, demandu tiun viron, kiel li surprizis sian edzinon . . . aŭ mi mem demandos lin.

MARKIZO (post rifuzado): Diru, Henriko, kiamaniere vi sukcesis surprizi ilin ambaŭ?

HENRIKO (meditinte longatempe): Ĉu vi ja konas mian edzinon? — Ŝi estas la plej bela kaj la plej malhonesta virinaĉo sub la suno. — Kaj mi amis ŝin. — De sep jaroj ni konas nin . . . sed nur de hieraŭ ŝi estas mia edzino. En

tiuj sep jaroj estis neniu tago, eĉ unu tago ne, en kiu ŝi ne mensogis al mi, ĉar ĉio en ŝi mensogas. Ŝiaj okuloj same kiel ŝiaj lipoj, ŝiaj kisoj kaj ŝiaj ridetoj.

FRANCISKO: Li iom deklamas.

HENRIKO: Ĉiu junulo kaj ĉiu maljunulo, ĉiu, kiu ŝin allogis — kaj ĉiu, kiu al ŝi pagis, ĉiu, mi opinias, kiu deziris ŝin, ja posedis ŝin . . . kaj mi sciis tion!

SEVERINO: Tion ne ĉiu povas diri pri si.

HENRIKO: Kaj malgraŭ tio mi amis ŝin, amikoj; ĉu iu el vi povas kompreni tion? Ĉiam de nove ŝi revenis al mi, de beluloj kaj de malbeluloj — de prudentaj kaj de malprudentaj, de fri-ponoj kaj de kavaliroj — ĉiam de nove al mi —

SEVERINO (al ROLLIN): Se vi do divenus, ke tiuj revenoj ja estas la amo.

HENRIKO: Kiom mi suferis . . . turmentojn! turmentojn!

ROLLIN: Tio estas korpremanta!

HENRIKO: Kaj hieraŭ mi edziĝis kun ŝi. Ni havis sonĝon. Ne — mi havis sonĝon. Mi volis foriri kun ŝi el ĉi tie. En izolejon, sur kamparon, en la grandan pacon. Kiel aliaj feliĉaj geedzoj ni volis vivi — eĉ pri infano ni revis.

ROLLIN (mallaŭte): Severino!

SEVERINO: Nu jes, jam bone!

ALBENO: Francisko, tiu ĉi homo parolas veron!

FRANCISKO: Certe tiu ĉi historio pri lia amo estas vera, sed la demando estas pri la historio de la mortigo.

HENRIKO: Mi malfruiĝis je unu tago . . . ŝi estis forgesinta ankoraŭ unu viron . . . neniu plu — mi supozas — mankis al ŝi . . . sed mi surprizis ilin kune . . . kaj li pereis.

LA AKTOROJ: Kiu? . . . kiu? Kiel okazis? Kie li kuŝas? — Ĉu vi estas persekutata? Kiel okazis? . . . Kie estas ŝi?

HENRIKO (pli kaj pli emociita): Mi akompanis ŝin . . . en la teatron . . . ĝi estu hodiaŭ la lasta fojo . . . mi kisis ŝin . . . ĉe la pordo — kaj ŝi iris supren en sian tualetejon kaj mi foriris kiel iu, kiu nenion devas timi. — Sed jam post cent paŝoj komenciĝis en mi . . . ĉu vi komprenas min? . . . iu grandega maltrankvilo . . . kaj estis, kvazaŭ io devigus min reiri . . . kaj mi reiris de nove tien. Sed tiam mi hontis kaj de nove foriris . . . kaj ree mi estis irinta cent paŝojn for de la teatro . . . jen, io min kaptis . . . kaj ree mi reiris. Ŝia sceno finiĝis . . . ŝi ja ne havas multon ludotan; ŝi nur staras dum iom da tempo sur la scenejo, duone nuda — kaj tiam ŝi finiĝis . . . mi

staras antaŭ ŝia tualetejo . . . mi premas mian orelon sur la pordon kaj aŭdas flustri. Mi neniun vorton povas elaŭskulti . . . la flustrado ĉesas . . . mi dispuŝas la pordon . . . (Li ekkriegas kiel sovaĝa besto): — li estis la duko de Cadignan kaj mi mortigis lin.

MASTRO (kiu fine konsideras lian rakonton kiel veron): Frenezulo!

HENRIKO (rigardas supren, rigide alvidas la MASTRON).

SEVERINO: Bone! Bone!

ROLLIN: Kion vi faras, markizino? En sama momento, en kiu vi vokas Bone! vi ĉion tion de nove igas esti teatro — kaj tiu agrabla frosttremado ĉesas.

MARKIZO: Mi la frosttremadon ne trovas tiel agrabla. Ni aplaŭdu, miaj amikoj, nur tiel ni povos liberigi nin el tiu ĉi sorĉo.

(Mallaŭtaj BONE! sonantaj pli kaj pli laŭte; ĉiuj aplaŭdas.)

MASTRO (al HENRIKO dum la bruo): Savu vin, forkuru, Henriko!

HENRIKO: Kio? Kio?

MASTRO: Tio sufiĉu; klopodu, ke vi venas eksteren!

FRANCISKO: Silenton! . . . Ni aŭskultu, kion diras la mastro.

MASTRO (post mallonga pripensado): Mi diras al li, ke li devas forkuri, antaŭ kiam la gvardioj

ĉe la pordoj de la urbo estos informitaj. La bela duko estis favorato de la reĝo — ili ekzekutos lin sur rado! (Al HENRIKO): Se vi ja prefere estus mortpikinta vian edzinon, la kanajlon!

FRANCISKO: Kiel bona kuneludo! . . . Belega!

HENRIKO: Prospero, kiu el ni ambaŭ estas freneza, vi aŭ mi? (Li staras kaj provas legi en la okuloj de la MASTRO.)

ROLLIN: Estas mirinde, ni ĉiuj scias, ke li ludas, kaj tamen, se nun la duko de Cadignan enpaŝus, li ŝajnus al ni ĉiuj fantomo. (Ekstere bruo, pli kaj pli fortiĝanta. Homoj eniras, oni aŭdas krii. Antaŭ ilia fronto GRASSET, aliaj, inter ili LEBRÊT, trudiĝas post li sur la ŝtuparo malsupren. Oni aŭdas kriojn: Libereco! Libereco!

GRASSET: Jen ni estas, infanoj, ĉi tien eniru!

ALBENO: Kio estas tio? Ĉu tio ankaŭ al apartenas?

FRANCISKO: Ne.

MARKIZO: Kion signifas tio?

SEVERINO: Kiuj estas tiuj homoj?

GRASSET: Ĉi tien eniru! Mi diras al vi, mia amiko Prospero havas ankoraŭ nun barelon da vino provize, kaj ni meritas ĝin! (Bruo de sur la strato.) Amiko! Frato! Ni havas ĝin! Ni havas ĝin!

KRIOJ EL EKSTERE: Libereco! Libereco!

SEVERINO: Kio okazis?

MARKIZO: Ni foriru, ni foriru, la popolaĉo alvenas.

ROLLIN: Ĉu vi volas foriri?

GRASSET: Ĝi estas ekokupita! La Bastiljo estas ekokupita!

MASTRO: Kion vi diras? — Ĉu li diras veron?

GRASSET: Ĉu vi ne aŭdas ĝin?

ALBENO (estas eltironta sian spadon).

FRANCISKO: Preterlasu tion, alie ni ĉiuj estas perditaj.

GRASSET (sur la ŝtuparo enŝanceliras): Kaj se vi rapidos, vi ekstere povos vidi ankoraŭ ion gajigan . . . sur stango tre alta la kapon de nia kara Delaunay.

MARKIZO: Ĉu tiu bubo estas freneza?

KRIOJ: Libereco! Libereco!

GRASSET: Al dekduo ni forhakis la kapojn, la Bastiljo estas nia, la arestitoj estas liberaj! Parizo apartenas al la popolo!

MASTRO: Ĉu vi aŭdas ĝin? Ĉu vi aŭdas? Parizo apartenas al ni!

GRASSET: Jen, kian kuraĝon li nun akiras. Jes, kriu, Prospero, nun jam nenio povas okazi al vi.

MASTRO (al la NOBELOJ): Kion diras vi al tio, vi kanajloj? Nun la ŝerco finiĝis.

ALBENO: Ĉu mi ne diris ĝin?

MASTRO: La popolo de Parizo venkis.

KOMISARIO: Silenton! — (Ili ridas.) Silenton! .... Mi malpermesas la daŭrigon de la prezentado!

GRASSET: Kiu estas tiu stultulo?

KOMISARIO: Prospero, mi respondigas vin pro ĉiuj tiuj ribeligaj paroloj —

GRASSET: Ĉu tiu bubo estas freneza?

MASTRO: La ŝerco finiĝis, ĉu vi ne komprenas tion? Henriko, diru ĝin do al ili, nun vi ja povas diri ĝin al ili, ni ŝirmas vin .... la popolo de Parizo ŝirmas vin.

GRASSET: Jes, la popolo de Parizo.

HENRIKO (staras kun rigida rigardo).

MASTRO: Henriko efektive mortigis la dukon de Cadignan.

ALBENO, FRANCISKO, MARKIZO: Kion li nun diris?

ALBENO (kaj ALIAJ): Kion signifas ĉio tio, Henriko?

FRANCISKO: Henriko, parolu do!

MASTRO: Li surprizis lin ĉe sia edzino — kaj li mortigis lin.

HENRIKO: Tio ne estas vero!

MASTRO: Nun vi jam ne bezonas timi, nun vi povas krii ĝin al la mondo. Jam antaŭ unu

horo mi estus povinta diri al vi, ke ŝi estas la amatino de la duko. Ĉe Dio, mi preskaŭ estis dironta ĝin al vi . . . Vi, krianta pumiko, ĉu ne vere, ni sciis ĝin?

HENRIKO: Kiu vidis ŝin? Kie oni vidis ŝin?

MASTRO: Kial vi nun zorgas pri tio? Li ja estas freneza . . . Vi mortigis lin, plion vi ja ne povas fari.

FRANCISKO: Pro la ĉielo; ĉu tio ja efektive estas vero aŭ ne?

MASTRO: Jes, ĝi estas vero!

GRASSET: Henriko — de nun estu mia amiko. La libereco vivu! Vivu la libereco!

FRANCISKO: Henriko, parolu do!

HENRIKO: Si estis lia amatino? Ŝi estis la amatino de la duko? Tion mi ne sciis . . . li vivas . . . li vivas. — (Grandioza emocio.)

SEVERINO (al la ceteraj): Nu, kie nun estas la vero?

ALBENO: Pro Dio!

(La DUKO trudiĝas tra la amaso sur la ŝtuparo.)

SEVERINO (kiu vidas lin la unua): La duko!

KELKAJ: La duko!

DUKO: Nu jes, kio do okazis?

MASTRO: Ĉu estas fantomo?

DUKO: Tute ne! Tralasu min!

ROLLIN: Per kio ni vetu, ke ĉiom estas arang-

ita? Tiuj buboj apartenas al la aktoraro de Prospero. Bone, Prospero, tio sukcesis al vi.

DUKO: Kio okazis? Ĉu oni ĉi tie ludas ankoraŭ, dum tie ekstere . . . Ĉu oni ne scias, kiaj aferoj okazas tie ekstere? Mi vidis preterportatan la kapon de Delaunay sur stango. Nu, kial vi rigardas min tiele? — (Li paŝas sur la plankon.) Henriko —

FRANCISKO: Gardu vin kontraŭ Henriko.

(HENRIKO kiel frenezulo ĵetas sin kontraŭ la DUKO kaj puŝas sian ponardon en lian kolon.)

KOMISARIO (leviĝas): Tio estas troa! —

ALBENO: Li sangas!

ROLLIN: Ĉi tie okazis mortigo!

SEVERINO: La duko mortas!

MARKIZO: Mi estas nekonsolebla, kara Severino, pri tio, ke mi ĝuste hodiaŭ vin kunirigis en ĉi tiun gastejon!

SEVERINO: Kial? (kun peno:) Tio estas mirinda hazardo. Oni ne en ĉiu tago vidas efektivan dukon efektive mortigatan.

ROLLIN: Mi ankoraŭ ne povas percepti tion.

KOMISARIO: Silenton! — Neniu forlasu tiun ĉi ejon! —

GRASSET: Kion volas tiu?!

KOMISARIO: Mi arestas ĉi tiun viron en la nomo de la leĝo.

GRASSET (ridas): La leĝojn faras ni, vi stultuloj! Eksteren ĉi tiujn kanajlojn! Kiu mortigas dukon, tiu estas amiko de l' popolo! Vivu la libereco!

ALBENO (eltiras sian spadon): Spacon ĉi tie! Sekvu min, miaj amikoj!

LEOKADIO (enkuregas malsupren sur la ŝtuparo).

KRIOJ: Leokadio!

ALIAJ: Lia edzino!

LEOKADIO: Enlasu min ĉi tie! Mi volas iri al mia edzo! (Ŝi venas antaŭen, vidas kaj ekkrias): Kiu faris tion? Henriko!

HENRIKO (rigardas ŝin).

LEOKADIO: Kial vi faris tion?

HENRIKO: Kial?

LEOKADIO: Jes, jes, mi scias, kial. Pro mi. Ne, ne, ne diru, ke pro mi. Tiom mi ne valoris dum tuta mia vivo.

GRASSET (komencas paroli): Civitanoj de Parizo, ni festos nian venkon. Hazardo kondukis nin sur la vojo tra la stratoj de Parizo al ĉi tiu agrabla mastro. Pli bele ne povis io koincidi. Nenie povas la krio: Vivu la libereco! soni pli bele ol ĉe la kadavro de duko.

KRIOJ: Vivu la libereco! Vivu la libereco!

FRANCISKO: Mi opinias, ke ni foriru — la popolo freneziĝis. Ni foriru!

ALBENO: Ĉu ni lasu ĉi tiun kadavron al ili?

SEVERINO: Vivu la libereco! Vivu la libereco!

MARKIZO: Ĉu vi freneziĝis?

LA CIVITANOJ, LA AKTOROJ: Vivu la libereco! Vivu la libereco!

SEVERINO (antaŭ la fronto de la nobeloj irante al la elirejo): Rollin, atendu hodiaŭ nokte antaŭ mia fenestro. Mi alĵetos la ŝlosilon kiel antaŭ kelkaj tagoj — ni havos belan horon — mi sentas min agrable emociita.

KRIOJ: Vivu la libereco! Vivu Henriko! Vivu Henriko!

LEBRÊT: Rigardu tiujn bubojn — ili forkuras de ni.

GRASSET: Lasu ilin hodiaŭ — lasu ilin — Ili ne evitos nin.

(Kurteno.)



Presita en la presejo Fratoj Hollinek,
Wien III. Steingasse 25.